

60 JAROJ DE LA PREZIDANTO DE I.S.A.E.

Antaŭ nelonga tempo (26. de oktobro) estis la 60. naskiĝtagreveno de Prof. B. Popoviĉ, la huna prezidanto de la Internacia Scienca Asocio Esperantista. Modesta, kiel kutime, li okazigis nenian feston, eĉ ne en la familia rondo. Estu ĝi tial notita iom dece en la Scienca Revuo, al kiu li donacis grandan parton de sia vivo.

Prof. Popoviĉ diris, kompreneble ŝerce, ke li festis nek la 50., nek la 60., naskiĝtagrevenon, "ĉar ne estas konata la ĝusta naskiĝdato". Nome la registrolibro de baptaj estis forbruligita dum la Unua Mondmilito. La patrino mortis kiam li havis nur 7 monatojn. La patron li same ne memoras, ĉar la patro pereis ĉe la suda jugoslavia limo, batalinte (kiel soldato de la serba armeo) por liberigo de sia lando. La geavoj, ĉe kiuj la infano kreskis, permesis ke oni enskribu ("surbaze de aserto de du atestantoj") la naskiĝtagon 26.10.1912., por ke la infano povu pli frue eniri la elementan lernejon. Kaj tiel restis, kvankam la naskiĝo okazis verŝajne (surbaze de postaj, privataj, esploroj) 20.10.1913.

La edukado de la juna Popoviĉ estis regula kaj li finis la universitatajn studojn (pri teoria kaj aplikita matematiko) en Beograd, en junio 1935. Nur komence de marto 1936. Popoviĉ fariĝis gimnazia profesoro. Sed - li ofte emfazas tion - la "neoficiala" komenco de lia instrua laboro estis 10 jarojn pli frue, ĉar de tiam datiĝas la privataj instruhoroj, per kiuj li kovradis "aldonajn vivbezonojn".

La unuan sciencan rezultaton Popoviĉ akiris jam en la 1938. j., sed vera reveno al la scienca laboro (post ĉesigo pro la militaj kaj postmilitaj cirkonstancoj) okazis nur en la 1948. jaro, kiam oni lin lasis el la Jugoslavia armeo por ke li fariĝu asistento en la Astronomia Observatorio de Beograd. Post iom da tempo li tie fariĝis scienca kunlaboranto kaj konstanta anstataŭanto de la direktoro. La doktoran disertacion (el Teoria astronomio) li defendis en la Naturscienca fakultato de Zagreb.

Sed sen la instruado li ne povis elteni longe kaj komence de la jaro 1954. li fariĝis universitata profesoro (Arbarkultura fakultato) en Sarajevo. Poste li transiris - kiel invitita profesoro - al la Elektroteknika fakultato de Sarajevo (1963.) kaj al la Teknika fakultato de la Universitato en Niš (1966.); fine li posteniĝis en la Trafikfaka fakultato de la Universitato en Beograd.

Kun Esperanto Popoviĉ renkontiĝis dum la unua studenta jaro - en la 1932. kaj li restis fidela al ĝi. Lia vigla tiukampa agado ek estis post la unua reveno al Beograd (1948.) kaj multe plifortiĝis post la akcepto de la tasko de la ĝenerala sekretario de ISAE (1953.), precipe kiam li transprenis esti ankaŭ la ĉefredaktoro de la Scienca Revuo (1962.). Pro sia sindona laboro sur diversaj sociaj kampoj, precipe por Esperanto, Popoviĉ estas distingita de la Prezidanto de SFR Jugoslavio per - tre alta - "Ordeno de laboro, kun ora girlando" (1965.). Pro la samaj kialoj, li estas tre ŝatata kiel prezidanto de la Jugoslavia Esperanto-Ligo kaj kiel prezidanto de la Internacia Scienca Asocio Esperantista.

M. ŠAPONJIĆ

SCIENCAJ VERKOJ
de Prof. Boj. Popović
gis la jaro 1972.

- 1a Jedan inverzni stav o asimptotskim vrednostima Laplasova integrala, GLAS CLXXXV Srpske Akad.nauka, Beograd, 1940, 33-46
- 1b Sur un théorème relatif aux valeurs asymptotiques de l'intégral de Laplace-Abel, BULLETIN de l'Académie serbe des sciences, Beograd, 1941, 6-11
- 2 Veza izmedju postupaka zbirljivosti i razmaka konvergencije, VESNIK Društva matem. i fiz. Srbije, Beograd, I (1949.), 121-130
- 3 O nekim asimptotskim inverzijama Cesaro-va postupka zbirljivosti, ZBORNIK radova Matem. Inst. Akad.nauka, Beograd, I (1951), 83-90
- 4a Novi oblici jednačina poremećaja u kretanju planeta, GLAS 198 Akad.nauka, Beograd, Nova ser.3, 1950, 129-139
- 4b Les équations nouvelles des perturbations dans le mouvement des planètes, BULLETIN de l'Acad.serbe des sciences, V (Sci. math. 1), 1952, 123-126
- 5 Nouvelle méthode pour obtenir les équations des perturbations des éléments elliptiques, MEMOIRES de l'Observatoire astronomique, BEOGRAD, V (1949), 11-25
- 6 Liaison entre deux systèmes d'équations des perturbations des éléments vectoriels, MÉMOIRES de l'Obs.astr.Beograd, V, 53-63
- 7 Uticaj eventualne rotacije Sunčeva sistema na kretanje planeta, VESNIK Društva mat. i fiz. Srbije, Beograd, V (1953), 77-93
- 8 Nove formule i tablice za f i g kod izračunavanja heliocentričnih položaja malih planeta, RASPRAVE Jugosl.akad.znanosti i umjetnosti, Zagreb, Vol.1, n-ro 7 (1956), 199-222
- 9 Приближенное вычисление элементов орбиты малой планеты и трех гелиоцентрических положений, GLASNIK matematičko-fizički i astronomski, Zagreb, Ser.II, T.11 (1956), 47-52
- 10 Specialperturboj de vektoraj elementoj de planetetorbito, VESNIK Društva matem. i fiz. Srbije, Beograd, VIII (1956), 47-52
- 11 Les éléments corrigés de la petite planète 1952 EA, BULLETIN de l'Observ.astronomique, Beograd, XX (1955), 14-15
- 12 Pri preciza kalkulado de vektoraj konstantoj de planetetorbito, BULLETIN de l'Observ.astronom., Beograd, XX (1955), 20-22
- 13 Npravilna primena metoda najmanjih kvadrata pri odredjivanju visinske krive sastojine (Nekorekta apliko de la metodo de minimuma kvadratsumo,...), RADOVI Poljopr.-šumarskog fakulteta u Sarajevu, Ser.B (Šumarstvo=Arbarkulturo), 1, 1956, 161-175
- 14 Mala planeta 1952 EA i pouzdanost izračunavanja elem.pl. putanje (Planedeto 1952 EA kaj la certeco de la kalkulitaj elementoj de planetetorbito), VESNIK Društva matem. i fiz. Srbije Beograd, VIII (1956), 203-210
- 15 Vektoraj elementoj de elipsa movižo de dukorpa mascentro čirkaŭ tria korpo, BILTEN Društva matem. i fiz.Makedonije, Skopje VII (1956), 24-33
- 16 Kepler-ležoŝ por la perturbata planedmovižo, BILTEN Društva mat., fiz.Makedonije, Skopje, VII (1956), 34-48
- 17 Pliprecizigoj de eltrovataj rapidoj de planetetoj, BULLETIN de l'Observ.astronomique, Beograd, XXI (1956), 11-22
- 18 Eltrovado de la vektoraj elementoj de planetetorbito el du observoj kaj la moviždirekto, I (Teorio), VESNIK Društva mat. i fiz. Srbije, Beograd, IX (1957), 37-54
- 19 Eltrovado..... (v.18), II (Apliko de la metodo), BILTEN Društ. mat.fiz.Makedonije, Skopje, VIII (1957), 29-37

- 20 Senpera korektado de la vektoraj elementoj de planetorbitoj, SCIENCAJ STUDIOJ de Internacia Scienca Asocio Esperantista (Jubileo), Kopenhago, 1958, 133-142
- 21 Interpolaj formuloj kaj tabeloj por rapidkoordinatoj de Suno k de..., BULLETIN de l'Obs.astr.Beograd, XXI, (1956), 17-25
- 22 Odredjivanje vektorskih elemenata putanja malih planeta (Eltrovado de vektoraj elementoj de planetorbitoj), RADOVI Naučnog druš.Bosne i Hercegovine, Sarajevo, XI (1958), 99-150
- 23 Neposredno i naknadno utvrdjivanje debljinskog rasporeda sastoijine (Senpera kaj posta restarigo de distribuo de arbdiametroj), RADOVI Polj.-šum.fakulteta, Ser.B (Šumarstvo), II/2 (1957), 165
- 24 Esplorado pri utiligebleco de cirkla orbitoj de planetetoj, BULLETIN de l'Observ.astron., Beograd, XXII (1957), 19-30
- 25 Uticaj posmatr.i račun.grešaka u astron.računima (Influo de observaj kaj kalk.eraraj en astronomiaj kalkuloj), VESNIK Društva matem.i fiz.Srbije, Beograd, X (1958), 141-157
- 26 Pri avantažoj de Gibbs-aj super Gauss-aj esprimoj por la triangulrilatoj en planetorbitoj, BILTEN Društva matem.i fiz.Makedonije, Skopje, VIII (1957), 22-28
- 27 Pri uzo de la lokocentra kaj baricentra koordinatoj en apliko de la metodo de Laplace, BULLETIN de l'Observ.astronomique, Beograd, XXIII (1958), 1-5
- 28 Вычисление векторных элементов орбиты малой планеты из трех гелиоцентрических положений, GLASNIK mat.fiz.i astron., Zagreb Ser. II, T.14 (1959), 151-158
- 29 Kalkulado de planet-kaj kometefemeridoj senpere el iliaj pozicio kaj rapido, BULLETIN de l'Observ.Astron.Beograd, 24 (1959), 13
- 30 Sekularni poremećaji vektorskih elemenata planetskih putanja = Sekularperturboj de vektoraj elementoj de planetorbitoj, RADOVI Naučnog društva Bosne i Hercegovine, Sarajevo, XIV (1960), 1-50
- 31 Eltrovado de planeteperturboj pere de komencaj suncentra pozicio kaj rapido, VESNIK Druš.mat.fiz.Srbije, Beograd, XI (1959), 151
- 32 Elimino de areointegraloj el ekvacioj de planeteperturboj en vektoraj elementoj, BILTEN Društva matem.i fiz.Makedonije, Skopje, X (1959), 29-38
- 33 Utilisation des cracoviens en astronomie, 1. Symposium international sur les calculs géodésiques, Cracovie, Pologne, 1959
- 34 Izračunavanje zapremine oborenog stabla (Kalkulado de volume de la trunko), RADOVI Šumarskog fak.Sarajevo, 1959, IV/4, 211-22
- 35 Nešto o odredjivanju srednjeg prečnika stabla (Pri difino de la diametro de arboj), RADOVI Šum.fak.Sarajevo, 1962, VII/7, 305-341
- 36 Svodjenje na kvadrature poremećaja I reda u vektorima položaja planeta (Redukto al kvadraturej de la perturboj de la unua ordo en planedaj pozicivektoroj), VESNIK Društva matem.i fiz. Srbije, Beograd, XIV (1962), 169-186
- 37 Über die zur Quadraturen reduzierten Störungen zweiter Ordnung der Planetenortsvektoren, ANNALES Acad.Scient.Fennicæ, Ser.A. III Geol.-Geogr., 61, 209-214
- 38 Inversija singularnih matrica (Inversado de singularaj matricoj) PUBLIKACIJE Tehničkih fakulteta u Sarajevu, V, 1/2 (1964), 7-29
- 39 Sila privlačenja ekvatorskog prstena Zemlje (Altirforto de la ekvatora ringo de la Tero, SIMPOZIJUM astronomia Jugoslavije, povodom 75 god.Astr.Opserv.u Beogradu, PUBLIKACIJE 12 (1967), 157-72
- 40a Kretanje satelita oko osnosimetrične planete (Moviĝo de satelito ĉirkaŭ aksosimetria planedo), ZBORNIK 1966/67 Tehničkog fak. u Nišu, 1968, 5-19
- 40b Движение спутника около осесимметричной планеты, XVIII International Astronautical Congress, Beograd 1967 (Pergamon Press and Polish Scien.Publishers), 1968, 42-55